EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 66>** ● AMO 96 ● Nepalo ● Nov-Zelando ● Japanio ● Ĉeno **< nov. 29**

## AMO 96 jarfine, jen la subtemoj

Tio okazos en Tieso, Senegalo, kaj per tio ni fermos la mirindan serion da 15 AMO-seminarioj en 2022. La ĉefa temo estas 'Interafrika kunlaboro' kaj la subtemoj estos la jenaj:

- -Administrado/mastrumado de organizoj
- -Mastrumado de retejoj
- -Verkado de artikoloj/filmoj por gazetaro
- -Internacia kunlaboro/bona komunikado
- -Verkado de projektoj/stipendi-petado al eksteresperantaj organizoj

La Seminario celas ĉefe  membrojn de la afrika komisiono, sed ankaŭ aliaj aktivuloj el diversaj landoj povos partopreni. Ni bonvenigas ankaŭ prelegojn, kaze ke membroj povas ion prezenti, ni estos dankemaj.

Jeremie Sabijumva

# Nov-Zelando elstarigita en Juna amiko

Proksimiĝas la jarfino. Tio signifas, ke jam aperis ok numeroj de *Juna amiko* tra la lastaj du jaroj. En la rubriko LASTE, ni prezentis du-jaran serion da tekstoj kaj bildoj pri la mirinda vojaĝo (odiseado) de la Nov-Zelande naskiĝinta Stefan MacGill, kiu okazis en la jarfino de 2019. Por EKO kaj aliaj celoj, jen la tekstoj en la ordo en kiu ili aperis en la helpilo por lernantoj subtenataj de ILEI. Tiu ordo ne estas nepre kronologia. La granda



odiseado de dec 27-jan 10 ja okazas kronologie, sed ni poste aldonis pliajn flankvojaĝojn okazintajn antaŭ la granda odiseado. La nuna prezento ebligasas al ni grandigi la bildojn, kiuj aperis en eta formato en *Juna amiko* ĉar ili estis fotitaj kun alta kvalito. Ekde 2023, la rubriko LASTE transiros al

prezento de la simila odiseado tra la Norda insulo en januaro 10-30, 2020.

Se vi volas konatiĝi kaj amikiĝi kun Nov-Zelando, jen via eblo. Legu la ampleksan alkroĉaĵon, kun la tekstoj el "Juna amiko" kune kun pli grandaj ilustraĵoj.





Plia servo de EKO!

# Kvina Speciala Ekskurso (2023) en Nepalo

Nepala Esperanto-Asocio anoncas la 11-tagan specialan ekskurson komenciĝontan la 26an de februaro kaj daŭrontan ĝis la 8a de marto 2023. Ĉiuj nun scias ke NEspA okazigas la Himalajan Renkontiĝon ĉiun duan jaron. Ni pasintece okazigis la Himalajan Renkontiĝon post tia intervalo, sed pro diversaj kialoj la Renkontiĝoj eble estontece iĝos pli malregulaj. Post 2019, pro la Kovid-pandemio, ni ne sukcesis realigi la sekvan okazigotan. La Himalaja Renkontiĝo signifas plejparte piedvagadon en montaro, sed tio ne taŭgas al ĉiuj aĝgrupoj. Multaj samideanoj volas viziti Nepalon, sed hezitus fari tian marŝadon. Jen do la kvina fojo en kiu ni okazigas ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj, atingeblaj per buso kaj situantaj en belaj pejzaĝoj, de kie famaj montaroj estas videblaj, ekz. al Ĉitŭan Nacia Parko, Pokhara (la plej fama turisma loko de Nepalo), Sikles (la plej bela kultura loko en Nepalo kie hejmrestado eblas) kaj Gorkha (historia montara urbo ligita kun la fondo de moderna Nepalo). La ĉefa celo de la programo estas konigi Nepalon kaj nepalajn esperantistojn al la mondo kaj reciproke. Petu de NesPA la laŭtagan programon.

Erie de tio: Vizito al Baudhnath kaj Pasupathinath. kaj Patano. Ekskurso al Nagarkot, tre alta loko super la valo, de kie videblas preskaŭ ĉiuj montaroj de Nepalo se la vetero favoras; Observado de birdoj antaŭ matenmanĝo; veturado per kanoto kaj promenado antaŭ la tagmanĝo; elefantrajdo kaj ĝangala vizito per speciala veturilo Ekveturo al Pokhara, kaj tie ekskurso al diversaj lokoj de la valo. Vizito al Sikles kaj Gorkha, reveno al Katmanduo/

Por pliaj detaloj bv. kontakti Nepalan Esperanto-Asocion: Nespa.1990@gmail.com

# La homa ĉeno – 4a parto de la filmo

Jen bonkvalita filmo pri homoj multlande, kiuj partoprenis en tiu homa ĉeno.

https://www.youtube.com/watch?v=KB2UNDMrbv8

Alessandra Madella, estrarano de ILEI

# Japanaj instruistoj agas

La ILEI-sekcio en Japanio mem ne organizas retan kurson, sed en multaj lokaj grupoj kaj eĉ en kelkaj universitatoj oni instruas Esperanton rete aŭ ĉeeste. Tiuj kursoj ne ĉiam estas por komencantoj. Same kiel en aliaj landoj, multaj junuloj lernas nian lingvon per Duolingo. JEI kune kun ni planas okazigi retan enkondukan kurson.

ILEI-JP ekde la lasta septembro plenumas paroligan kurson nomatan "Ni parolu!". Tio tre similas al "Ekparolu!" de edukado.net. Japanoj estas tre hezitemaj interparoli kun alilandanoj, do kelkaj membroj de ILEI-JP helpas al ili alkutimiĝi al interparolo en Esperanto. Ni uzas la japanan laŭbezone. Post la fino de la dek sesioj, kelkaj kuraĝe aliĝis al "Ekparolu!"

Tieko Isikawa

# La reta kongreso de UEA

Informoj pri la muzikalo "June kaj Kune". Tio estas tutnova muzikalo plene en Esperanto kreita de esperantistoj ,kiu temas pri esperantistoj kiuj partoprenas IJK-n. La bona novaĵo estas, ke la 26-an de novembro ĝi estis respektebla rete kadre de la evento Retoso kiu estas parto de la Virtuala Kongreso (VK), do eĉ tiuj kiuj ĝis nun ne povis partopreni grandajn Esperanto-aranĝojn, povas ekhavi ideon pri tio kio okazas dum tiaj aranĝoj. Vi povas aliĝi al la Virtuala Kongreso ĉi tie: https://vk.esperanto.net/2022/

Barta Zoltán, TEJO

# Slovenoj festos

Esperanto-Societo Ljubljana (ESL) invitas al la solenaĵo kaj kuniĝado okaze de la 163-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof kaj al honorigo de la Tago de la Esperanto-libro kaj de la Tutmonda tago de homaj rajtoj

Mallonga ligo al Eventa Servo: https://eventaservo.org/e/47d712.

Ostoj Kristan, sekretario de SIEL

Ni alkroĉas la dulingvan indikilon.

# Pola universitato proponas kursojn

La Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando petis nin plusendi tiun ĉi informon al vi. Ni supozas, ke vi interesiĝos precipe pri la dua kurso, nome „Kurso por verkistoj, ĵurnalistoj, aŭtoroj de blogoj kaj aliaj".

Personoj por kiuj la aliĝkotizo estas tro alta, povas peti subvencion de FEL.

Eble povus plibeligi viajn tagojn regula renkontiĝado kun afablaj gesamideanoj, dum lernado de kaj pri Esperanto. La fama Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando, proponas al esperantistoj de la tuta mondo du diversajn kursojn, gvidotajn vive en Interreto.

**kurso 1**
Eraroj ne estas pekoj, sed… korektu ilin!

Agrable kaj kuraĝe korektu ĉiajn malperfektaĵojn en via lingvouzo, sub gvido de sperta instruistino. Vi ricevos multe da helpo pri la individua uzado de la lingvo.

**kurso 2**

Kurso por verkistoj, ĵurnalistoj, aŭtoroj de blogoj kaj aliaj interesiĝantoj

Iuj verkantoj de tekstoj alfrontas lingvajn malfacilaĵojn, videblajn i.a. en iuj retpaĝoj, en kiuj estas publikigitaj beletraj aŭ aliaj tekstoj. Tiaj malfacilaĵoj ne malofte ĝenas redaktadon, ili estas ankaŭ obstaklo en beletra kreado.

Jen tria okazigo de la sukcesa kurso el la pasintaj jaroj, destinita por verkantoj de diversaj tekstoj. La skribaj aktivaĵoj ampleksos leksikon, gramatikon, donos specialan atenton al sintakso kaj zorgado pri stilo. La programo respektos la individuan stilon de la partoprenantoj, okazos laboro pri ties disvolvado, krome, lernado per la stilo de modelaj verkintoj de la Esperanto-literaturo. La partoprenantojn surprizos interesaj kaj tute nekutimaj ekzercoj.

# Facila vento blovas por vi

Aperis "Facila Vento" N-ro 1 - la Kongresa Kuriero de la 3-a Virtuala Kongreso de #Esperanto: https://revuoesperanto.org/facila_vento1 Legu nun!

# Mamduhi de ILEI en la ĉina radio

https://esperanto.cri.cn/2022/11/23/ARTIxwqZZZRXj4FDGYiQYwwr221123.shtml

Alessandra Madella

# Germana jarfino

Trovu en alkroĉaĵo informojn prui tri jarfinaj ofertoj.

========= vortoj:  1080 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio, Slovenio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.